

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norla, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanon.

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

ADMINISTRIO:
Köln Horrem, Rejnlando, Germanio.
Germ. poŝteka konto 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptoj oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administracio per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatoj (ne-esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 svisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaj aŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 60 flinaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la laga kurzo. — Balkanaj kaj baliaj ŝtatoj pagu 70 germ. mk., Rusio 12000 rubl. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole alian sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. Germanioj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administracio Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 1.50 mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 2 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/2 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/4 jarabono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 63 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 18. Dez. 1921.

Finnlanda Parlamento por Esperanto.

Denova Subvencio de 25000 Fmk. al Esperanto-Asocio de Finnlando.

Tre ĝojigis nin la esperantlingva telegrafa sciigo el Helsingfors pri la nova granda sukceso de la finnlandaj samideanoj, kiun ni povis mal-longe komuniki al niaj legantoj en nia lasta numero. Kaj same ĝi certe ĝojigis la tutmondan Esperantistaron.
Jam la duan fojon ni jen vidas la fakton, ke la elektitaj reprezentantoj de antaŭenema popolo voĉdonas konsiderindan sumon por subvencio al la Esperanta movado. Tiom pli nin ĝojigas tiu fakto, ĉar Finnlando estas la lando, kiu en venonta jaro gastigos la XIV-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi donas al ni la garantion, ke la finnlandaj estraroj laŭforte kaj laŭpove akcelos la sukceson de la kongreso, precipe laŭ la oficiala flanko.



Esperanto-kaj Arto:
Prezentado de „Una partita a Schacchi“ en Esperanto („Ŝakludado“) en la Teatro Maffei, Rovereto.
La 12. novembro prezentis la Esp. Rondo Rovereto du teatraĵojn: „Ŝakludado“, de Jozefo Giacosa, kaj „La Renkonto“, de M. Hinkel, antaŭ preskaŭ 300 personoj. La sceneja kaj kostuma aranĝo estis miriga, kaj la aktoroj — ĉiuj rondanoj — altiris al si la aplaŭdojn kaj laŭdojn de la ĉeestantoj. La loka kaj regiona gazetaro publikigis artikolojn pri la teatra prezentado kaj tiokaze ankaŭ pri nia movado, bondezirante al ni plenan sukceson. La impresoj al la ĉeestantoj estis tre bonaj: rezultato estas du kursoj: unu por studentoj de gimnazio kaj de la teknika lernejo (gvid. prof. d-ro Robol), dua por aliaj personoj (gvid. d-ro Mondini).

eblojn kun multaj samideanoj, kiuj faris spertojn dum pasintaj kongresoj. Li, kiel ankaŭ aliaj delegitoj, kiuj havis la emon, apogi la invitantan urbon, ekz. s-o I. el Wiesbaden, rezignis el tre bonaj motivoj.
Ankaŭ la finnaj Esperantistoj ne facilanime donis la inviton kaj poste ĝin apogis. Ili komence nur deziris inviti la XV-an. Ili preparolis ĝin kun la membroj de la konstanta komitato, kun multaj iamaj organizintoj, kun la ĉeestantaj estraranoj de ĉiuj naciaj asocioj kaj kun la estroj de UEA. Ankaŭ illa sincereco estas simpata kaj fidinda.
Ne hazardo, sed faktoj parolis por si mem, alie ni sendube estus aŭdintaj lun kontraŭvoĉon. Per aplaŭdoj, per gajaj voĉoj la unuanima kaj unuvoĉa decido estis prenita. Tio devus suflĉi.

Ĉiuj samideanoj intencantaj partopreni la XIV-an, jam nun anoncu tion al la Loka Kongresa Komitato, por instigi per frutempa multnombra aliĝo la estrarojn de Finnlando al plej granda interesiĝo kaj plej intensa helpo. Uzu por aliĝo la presitaĵn aliĝilojn aldonitajn al la hodiaŭa numero de ET!

La urbo de la XIV-a.

Strange! Iu samideano, kiu kaŝas sian nomon sub C. L., publikigas artikolon en la oktobra numero de „Germana Esperantisto“ pri la venonta XIV-a kongreso kaj samtempe publike demandas la delegiton de Danzig pri la kaŭzoj, kial li fine ne apogis la inviton.
La afaktoj ne nur estas sendisciplinaj, sed ankaŭ eraraj kaj vanaj. Malbone estus, se la organizantoj de la XIV-a en Finnlando jam je la komenco de la laboroj momente kredus, ke la unuvoĉa decido de la XIII-a kongreso en Praha, en kiu partoprenis pli ol 2000 esperantistoj el 40 nacioj, ne suflĉus por garantii la sincerecon de la gastigontoj. Grandegajn oferojn, grandan laboron, profundan Esperantisman ĉiu kongreskomitato estas devigata montri. Ni tial studu la demandon profunde, antaŭ ol publikigi kritikon

en ĵurnalo monata, kiu ne havas la eblon jam la sekvontan tagon doni klarigojn.
Je la honoro de la skribinto ni povas supozi, ke li ne partoprenis je la kongreso en Praha, alie li certe estus havinta la kuraĝon tuj eldiri sian opinion.

Pri la delegito de Danzig, s-o Ketterling, ĉiuj, kiuj konatiĝis kun li, havas la saman opinion. Li ne nur estas tre simpata, fidinda kaj agema Esperantisto, sed li ankaŭ estas klera homo, kiu profunde pripensis la inviton, saĝe preparolis la

Nuna Stato de la Sciencaj Institucioj.

Pro diversaj malfacilaĵoj nur estis eble ĝis nun, aldonigi la presitan propagandfolion al „Esperanto Triumfonta“ kaj (antaŭ kelkaj tagoj) al „Esperanta Finnlando“. Konsiderante tion, la nuna stato de entute 192 aliĝoj el 21 diversaj ŝtatoj de 3 kontinentoj (Eŭropo, Ameriko, Aŭstralio) estas kontentiga. Kontentiga ankaŭ estas la monŝtato; la grandanime donacitaj monsumoj permesis pagi ĉiujn elspezojn necesajn kaj eĉ restilas sumeton por la sendkostoj de la proksimaj monatoj. Pli ol kontentiga estis ankaŭ la laboro (honorofica, t. e. senrekompensa) de la sekretario, kiu ekz. en oktobro forsendis 231 poŝtaĵojn kaj ricevis 76. Tial ne ĉagreniĝu, se vi ne tuj ricevos respondon! Ĝojiga estas la stato de la komitato. Jen estas la adresoj de la aktivaj komitatanoj, kiuj volonte akceptas aliĝojn el siaj landoj:

- Prof. Alessio, Via San Pietro 92, Padova p. Itali.
 - Prof. de la Faille, Röellstraat 8, Arnhem „ Nederl.
 - Prof. Kamaryt, Telocviĉne 3, Bratislava „ Ĉeĥoslov.
 - Prof. Krestanoff, str. Vene lin 9, Sofia „ Bulgari.
 - P. v. Medem, Smelju gatve 12, Kaunas „ Litovl.
 - D-ro Müllhaupt, Schauptg. 33, Bern „ Svisl.
 - Inĝ. Pratley, 469 Clarke Av., Westmount „ Kanado
 - D-ro Robin, Marszalk 113, Warszawa „ Poll.
 - S-o Setälä, Albergg „ Finnl.
 - S-o Wagner, Fabiniŝtr. 2, Sibiu, Transilv. „ Rumanl.
 - D-ro Döhler, Goethestr. 55, Riesa (Elbe) „ Germanl.
- kaj ĉiuj aliaj landoj.
- Plue estas komitatanoj:
Prof. Cart, Paris; d-ro Steche, Leipzig; Stettler, Bern; Verax, Paris; pastro Ĉe, Cluj.

Laŭ interkonsento kun d-ro Robin, la pola komitatano, ni ĉesigas la akcepton de polaj gesamideanoj je la kotizo presita en nia flugfolio. La fundamenta kotizo estu de nun 250 pol. mk. (M. = 250; A. = 500; M. A. = 625). Ni penos konservi la ĝisnunajn kotizojn por tiuj, kiuj jam aliĝis, se la eldonejo konsentos!
La malgranda nombro de la ĝis nun aliĝintoj devigas nin forte daŭrigi nian propagandon, por ke la nombro 500, kiu estas tute necesa por la risiko eldoni la Revuon, estu baldaŭ atingata. La sekretario, kiu jam posedas liston de ĉ. 1000 Esp-aj sciencistoj, petas la sendon de interesulaj adresoj. Eble li denove devos presigi alvokon sendotan rekte al tiuj gesamideanoj. Tial ne ĉesu en viaj mondonacoj, ĉiu elspezo estas severe kontrolebla kaj kontrolota.
La sekretario esperas povi aranĝi la eliron de la 1-a kajero de „Sciencra Revuo“ en marto-aprilo. La sola kondiĉo estos la stato de la abonpromesantoj.
Tial helpu propagandadi kaj varbi.
Riesa, la 3-an de dec. 1921.
D-ro Walter Döhler, sekretario.

- Unua kvitanco (aŭg. ĝis novembro 1921) de libervolaj donacoj por la aranĝaj laboroj.**
- Aŭgusto:**
23. Döhler, Riesa 100 m. germ.
- Septembro:**
10. Wohlstadt, Hamburg 20 m. germ.
28. van Heek, Hengelo 500 kr. ĉeĥ.
28. Mommery, Hehn 10 m. germ.
30. Sievers, Braunschweig 50 m. germ.

- Oktobero:**
1. Schauer, Schönbrunn 10 m. germ.
2. Atanasoff, Halle 5 m. germ.
4. Steche, Leipzig 100 m. germ.
5. Christaller, Stuttgart 20 m. germ.
6. Ferber, Mannheim 5 m. germ.
11. de Wahl, Tallinn 20 m. germ.
12. Jacob, München 10 m. germ.
14. Grünthal, Haapsalu 100 m. germ.
15. Fujisaŭa, Genève 90,90 m. germ.
15. Meagher, Dublin 100 m. germ.
15. Bassi, Frankfurt 10 m. germ.
19. Stelman, Warszawa 100 m. pol.
20. Wüster, Berlin 50 m. germ.
20. Gilaser, Karlsbad 20 kr. ĉeĥ.
23. Tiard, Paris 5 fr. fr.
23. Cosic, Paris 5 fr. fr.
23. Pillault, Orleans 200 m. germ.
26. Darch, Bristol 116 m. germ.
31. Grenkamp, Jaslo 100 m. pol.
31. Pratley, Montreal 5 dol. kan.
- Novembro:**
11. Atanasov, Sofia 20 lev. bulg.
12. Esp. Grupo, La Creusot 10 fr. fr.
17. van Tinteren, Amsterdam 50 m. germ.
17. Romein, Tiel 250 m. germ.
18. Simeonov, Sofia 10 lev. bulg.
23. v. Medem, Kaunas 30 m. germ.
23. Rudzinska, Kaunas 10 m. germ.
23. Levine, Denver 1 dol. us.
23. Wilson, Montreal 1 dol. kan.
26. Radlmeser, Rzeszów 50 m. pol.
28. Smital, Wien 100 m. germ.
30. Arnold, Zug 5 fr. sv.
- Plue ni ricevis la 10-an de nov. 10 ekz. vendotajn „Novák, Ĉeĥa Literatura laŭ la birdperspektivo“ de la tradukinto V. Krouzil.
Koran dankon al ĉiuj!

Du Konkursoj de ET por ricevi internaciajn spritaĵojn kaj anekdotojn.

- I. SPRITAĴOJ.**
- Premioj:**
1 tutjara abono al ET,
2 duonjaraj abonoj al ET,
4 kvaronjaraj abonoj al ET
5 „Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof“.
- Kondiĉoj:**
1. Ĉiu konkursanto rajtas sendi plurajn spritaĵojn; sed ĉiu spritaĵo devas esti skribita sur aparta folieto. La spritaĵo devas esti signifita per la devizo kaj per la nomo de la lando, el kiuj ili devenas; por sendanto de pluraj spritaĵoj suflĉas unu sama devizo. La nomo de la sendanto ne estu sciigata.
2. La spritaĵoj devas alveni ĉe la redaktejo de ET ĝis 1. marto 1922.
3. Ĉiuj senditaj manuskriptoj fariĝos posedaĵo de la eldonejo de ET, kiu rajtas aperigi ilin en ET aŭ en libra formo sen pago de speciala honorario.
4. Juĝistaro estos la redaktorado de ET kaj kelkaj aliaj kompetentaj samideanoj ankoraŭ elektotaj.
5. La devizoj de la premiitaj spritaĵoj estos publikigitaj en ET, por ke la sendintoj indiku sian nomon.
- II. ANEKDOTOJ.**
- La samajn premiojn ni destinas por sendontoj de internaciaj anekdotoj. Por tiu konkurso validas la samaj kondiĉoj kiel por la unua. Sed spritaĵoj kaj anekdotoj oni sendu aparte kaj kun malsamaj devizoj.

5. Ĉu ĉefurbo en iu lando, en kiu la centro de la registaro, de la gazetaro, de la lernejoj, de la industrio kaj de la komerco estas atingibla, ĉu iu malpli grava urbo? En Helsingofo la nomitaj centroj troviĝas kaj en ĝi ankaŭ la aliaj naŝaj ambicioj centriĝas. Komparu la liberan urbon Danzig kaj ĝin politikan, etnografian kaj kulturajn centrojn Berlin kaj Varsovio.

6. Ĉu urbo kiel efektiva centro de sufiĉe grandnombra popolo, ĉu urbo sen lando? Komparu la liberan urbon Danzig kaj la urbon Hamburgo kun Helsingofo, la centro de la tuta finna popolo.

7. Ĉu urbo kaj lando bela aŭ malpli bela? Helsingofo estas unu el la plej belaj urboj. Finnlando havas naturon absolute memstaran, strangan kaj belegan. Pensu al miloj da lagoj (35 000), centoj da akvofaloj, miloj da insuloj, belegaj, helaj somernoktoj kaj multaj aliaj belaĵoj.

8. Ĉu lando, kies centroj kontraŭstaras Esperanton, ĉu lando, en kiu Esperanto estas kreskanta? Ĉu la delegito de Finnlando en la Ligo de Nacioj apogis la enkondukon? Jes. Ĉu la parlamento voĉdonis monhelpon? Jes, la finnlanda (eĉ dufoje). Ĉu la lando kun du aŭ pli naciaj lingvoj bezonas Esperanton? Jes, Finnlando.

Kiaj ĉefaj landaj gazetoj permesas oftajn artikolojn pri Esperanto? La finnlandaj. Kaj fine: Ĉu la unua alvoko al la popolo de la gasilgonta lando (vidu „Esperanta Finnlando“, oktobra numero) estas sen valoro? Ĝi enhavas interalie la vortojn „La subskribintoj, kiuj rekonas la ĝeneralan gravecon de internacia lingvo kiel kulturfakto al la nuntempa homaro kaj al la malgrandaj nacioj precipe, akceptas la specialan signifon, kiun la aranĝo de Internacia Esperanto-kongreso en nia ĉefurbo havas al la nacia vivo de Finnlando, kaj admonas ĉiujn subtenit laŭ fortoj kaj ebleco la Esperantistojn en ilia respondeca laboro“.

Kiuj subskribis tiun ĉi alvokon? 20 personoj bonege konataj en Finnlando. Inter ili vi trovas la direktoron de la laborista Instituto (d-ro Casarin), la finnajn ambasadorojn en Paris kaj Tokio (s-ojn Enckell kaj Ramstedt), la ministron de eksterlandaj aferoj (s-on Holsti), la sindikon de la centra komerca ĉambro (s-on Järvinen), la ministron de la publika instruado (s-on Liakke), la prezidanton de la turista asocio (prof. Homén), la 1-an prezidanton kaj la ambaŭ vicprezidantojn de la finna parlamento (s-ojn Vuoljoki, Mantere kaj Virkkunen), la direktoron de la centro de la kooperativaj vendejoj (s-on Vasenius) kaj kelkajn eksajn ministrojn kaj unuajn ĉefojn de gravaj organizacioj. Ĉu iu alia lando estus nuntempe povinta publikigi similan alvokon al la popolo de la lando? Bedaŭrinde ankaŭ neniu alia ol Finnlando. La alvoko garantias eksterordinaran efikon.

9. Ĉu ni konstante estas devigataj elektit kongreslokon en la mezo de Eŭropo? Pro la kosto de la vojaĝoj facilatingebla kongresloko estas dezirinda. Je la komenco de la Esperanta movado la unua tasko estis la pruvo, ke la diversaj nacioj sin povas kompreni, eĉ ke la timo pri disfalo en dialektoj estas tute ne necesa. Tion

pruvus ĉiuj kongresoj, ĉiuj kunvenoj kaj internaciaj interparoladoj. La dua tasko estis la ebligo al kiel eble plej granda nombro, persone partopreni je la kongresoj. La granda nombro de la adeptoj ludis rolon. Jen 13 fojojn la Esperantistaro en pli-malpli granda senco tion ebligis.

Alla demando estas, ĉu la grandegaj penadoj por la kongresoj havis la deziratajn rezultatojn?

Mi malkaŝe diras, ke nur malmultaj kongresaj komitatoj komprenis rikolti la fruktojn de la kongresoj. La publika propagando dum la kongresa semajno devus esti la ĉefa tasko de la komitato. Publikaj paroladoj, intensa varbado en la gazetaro, eĉ komunaj fotografadoj por la ilustrataj gazetoj kaj por la kinoteatroj estas dezirindaj. Kian efikon por la propagando havas niaj kunvenoj, festoj, teatraĵoj ktp., se ili okazas en fermitaj salonoj? Kian efikon havas klopodoj, se ili okazas en lokoj, kie la registaro ne sidas, kie la gvidantaj oficoj ne ekzistas? La estro de la polico, de la poŝto, de la porfremdulaj societoj, de la komunikadoj, de la universitatoj, lernejoj ktp. devas persone aŭdi kaj vidi, ke Esperanto taŭgas.

Ĉu ni multe aŭdis pri granda antaŭenpuŝo de la movado post ĉiuj el la ĝisnuna 13 kongresoj?

Mi same malkaŝe diras, ke efektive nur post la IV-a kongreso en Dresden la Esperanta movado multege gajnis, la urbo Dresden kaj la lando Saksujo Esperantiĝis. Kial? Ĉar antaŭ la kongreso la registaro kaj urboj, oficejoj, estis instigitaj scivoleme aŭdi kaj vidi, ĉar dum la kongreso publiko kaj gazetaro per propagandaj aranĝoj povis persone aŭdi kaj vidi la taŭgecon, kaj ĉar tuj post la kongreso la publiko havis la okazon en samtempe fondita Esperanto-Instituto eklerni Esperanton. Ĉu iu kongresa komitato du semajnojn post la kongreso povis raporti 1400 lernantojn?

Ni estonte postulu de niaj kongresaj komitatoj, ke ili studu la taskojn kaj la spertojn pri la pasintaj kongresoj. Mi havas la fidon, ke la finnaj aranĝantoj tion faris kaj faros. Ili almenaŭ aŭdis la spertojn kaj promesis, ilin inviti aŭ eviti la erarojn.

Kaj fine, kion diris la delegitoj de la invitataj urboj? Mallonge: S-o Istel el Wiesbaden diris, ke la tuta grupo havas nur 7 membrojn. Li saĝe ne povis garantii sukceson kun tiom malmultaj kunlaborantoj. S-o Ketterling el Danzig diris, ke la magistrato tute klare estis rifuzinta monapogon. La urbo nur estis promesinta ĉambro por la preparal laboroj. Ankaŭ li saĝe rezignis. Danzig bedaŭrinde ne ankoraŭ povas plenumi la necesajn postulojn. Pro la samaj kaŭzoj la aliaj delegitoj silentis. Resume la demando estas: Ĉu urbo kaj tuta lando garantias la plej grandan utilon al la Esperanta movado per la kongreso? En tiu jaro sendube Finnlando havas la plej grandajn ŝancojn.

Eĉ se la nombro pro la distanco neniel povos atingi tiun de Praha, jam la nombro de la finnaj, estonaj, svedaj, danaj kaj norvegaj Esperantistoj estas sufiĉe granda por garantii bonan viziton. Forta Esperanta movado en la nordo estas dezirinda.

Ni esperu, ke ankaŭ granda nombro de aliaj nacioj bone povu vojaĝi al la nordo,

kio ne ankoraŭ internacia Esperanta kongreso okazis.

Des pli bone, se la urbo kaj lando samtempe havas allogojn: turistajn, etnografajn, eĉ festajn kaj amuzajn. Ankaŭ en tiu rilato Finnlando plenumos niajn dezirojn bonege. Ke la finnlandaj samideanoj bone preparu ĉion! Nia tasko estas grandamase, sekvi la inviton. Ni ne malhelpu ilin per vanaj deziroj. Ni havu fidon, disciplinon kaj fine la internacian komunan dezirojn, helpi al la efektiveco de la enkonduko de Esperanto en ĉiuj mondpartoj antaŭ niaj okuloj.

Tial ĝis revido en Finnlando dum somero 1922!

K. v. Frenckell
Konsulo de Finnlando en Dresden
kaj kunaranginto de kelkaj Esperanto-Kongresoj
naciaj kaj internaciaj.

Represo en aliaj Esperanto-gazetoj dezirata.

La enhavo de ĉiu numero de ET

estas same tiel riĉa kiel tiu de 16-paĝa monata Esp. revuo, sed certe pli aktuala. Pro tio la abonprezo estas malalta. Abonu kaj abonigu!



Dante.

Dum tuta Italio fiere solenas la sescentan datrevenon (1321-1921) de la mortotago de l' Dia Poeto, ĝia plej granda verkisto, kiu perfekte donis al sia libro la forton ĉion esprimi, al siaj versoj la povon ĉion kanti, kiu krels tutan nemortontan teran kaj ĉielan mondon, kaj kies nesuperebla verko mirigas la tutmondon pro sia admirinda amplekso, perfekteco kaj profundeco; — dum ĉiuj civilizaciaj nacioj honoras tiun ĉi famegan artiston de l' penso, kiu ne nur estas nacia itala poeto sed profeta universala geniulo — dum la Ligo de Nacioj en solena kunveno laŭdegas Dante'n kiel nekompereblan profeton de la unueco de l' homaro, kiu jam en sia epoko pripensis, konceptis la ideon de unu komuna societo inter ĉiuj popoloj kaj esprimis la ideon de l' homara solidareco, —

Nokta Fantomo.

De Zanoni.

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj
L. L. Zamenhof.

Dum la pasinta nokto min vizitis la maljuna instruisto, ĉe kiu antaŭ pli ol dudek jaroj mi lernis Esperanton. Cetere li faras tion ofte, kvankam delonge li jam ripozas en eterna trankvilo. Nu, ĉi tio estas lia afero. Por konfesi la veron, mi ne amis lin, ĉar li estis tro severa, tro riproĉema, tro pedanta: vera lernejestro! Mi miras, ke li fariĝis Esperantisto kaj eĉ pli, ke li ne sukcesis abomenigi al mi Esperanton. Mi ne ŝatas tiun troŝagan pravamecon; ankaŭ la aliaj kunlernantoj sentis la samon kaj ili demandis ŝerce: „Ĉu vi scias la diferencon inter la bona Dio kaj nia instruisto?“ La respondo estis: „La bona Dio scias ĉion kaj nia instruisto scias ĉion... pli bone!“ Do, ankaŭ ĉi tiun fojon li min alparolis instrueme kaj kun certa supereco: „Mi vidas, ke vi forlasis la vojon, kiun mi montris al vi!“

Mi demande rigardis lin volante esprimi perfektan nekomprenon

„Vi ne scias, kion mi volis diri? Jen kion: Senripense vi renversis la tutan sistemon tiel zorge konstruitan kaj kulturitan de mi! Ĉu vi pensas, ke la Esperantistoj obeante viajn konsilojn fariĝos pli bonaj stilistoj? Ĉi tion ne imagu! Mi diras al vi: La ĝisosta analizado gramatika... jen estas la ĝusta kaj sola metodo por perfektigi la Esperantistojn en sia rilato! Kaj vi instruas nuran praktikon preskaŭ ne menciante la sanktan gramatikon?!“ Pro kolera fervoro li perdis la spiron.

Tiom pli libere ekspiris mi. Sendube, mi pensis, la maljunulo ne estas bone informita pri tio, kio okazis en Esperantujo post lia eterniĝo. Ĝisosta analizado gramatika? Ĉu tia metodo efektive iam ekzistis? Nu, ĉiukaze la Esperantistoj jam

ankaŭ la tutmonda Esperantistaro fieras partopreni la ĉiulandona laŭdon al la grandega geniulo; ĉar liaj pensoj pri la homara unueco kaj solidareco estas vera esenco de l' Esperantismo.

(Laŭ artikoleto de s-ano Ippolito Patti, Milano.)

(Rim. de Red.). Bedaŭrinde ni ne povis efektive igi nian intencon eldoni specialan numeron je honoro de la Dia Poeto, ĉar la diversaj artikoloj pri Dante, kiujn ni ricevis kaj kiujn ni sendis al kompetenta itala samideano por tralego kaj prilugo, ĝis nun, ŝajne perdiĝinte, ne revenis al ni.)

Komerco.

La 3-a Foiro en Praha.

La malfermo de la 3-a foiro okazis la 1. sept. sub la honora protekto de l' prezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko, Th. G. Masaryk.

La foiro pruvigis, ke ĝi estas kapabla kunvenigi sufiĉe da seriozaj interesuloj por sia ekspozitario. Inter la eksterlandaj vizitantoj estis reprezentataj preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, plie Turka, Palestina, Japana, Amerika kaj Nordafrika landoj resp. kontinentoj.

La nombro de ekspozitantoj atingis 2274, inter ili tie estis ankaŭ kelkaj el la landoj Germana, Aŭstra, Franca, Jugoslava, Svisa, Hispana, Algiera, Angla, Dana, Nederlando kaj Ameriko.

La spaco bezonita atingis 22 248,50 m². Negocoj estis faritaj por valoro de 1 040 451 950. — kĉ., sed pli vere la dumfoiraj negocoj ciferis je pli ol du miliardoj, ĉar la Foiro Borso multokaze ne estis informata pri la vendo.

La plej gravajn negocojn atingis la elektrotehnika kaj teksaĵa industrioj.

Pli estis negocataj jenaj ĉefaj eksportaj: Peltajoj, maŝinoj, aŭtomobiloj, ledajoj, ledogalanteriaĵoj, nutraĵoj, likvoroj, sukeraĵoj, ĉokoladoj, marmeladoj, keramikaj artikoloj, vitraĵoj, artikoloj de Jablonec (Gablonz), sportartikoloj, ludajoj, muzikinstrumentoj ktp.

Entute oni povas konstati, ke la foiro estis sukcesplena en komercoj tiel ekster-kiel enlanda.

La lasta foiro montris plene internacian karakteron, tiufoje akcentitan per Esperantismo, ĉar ne sole Esperantaj flagoj salutis malsupren de l' ĉefa ekspozicieja portalarco, sed ankaŭ interne de la oficiala pavilono kaj inter la standoj troviĝis kelkaj Esperantaj informoj.

Sendube la peresperanta propagando de l' foiroj prosperige influos la historion de l' Esperantismo, enpenetrigonta la utiligon de Esperanto en la komerca korespondado.

La 4-a foiro en Praha okazos de 12-19. marto 1922.

La komerca ĉambro de Locarno

interesigis por Esperanto la sviajn komercajn ĉambrojn. Nau respondis favore nur unu respondis malfavore.

Internacia Labora Oficejo.

En n-o 60 ni jam povis raporti pri la grava rezolucio de l' 19. nov. rilate Esperanton. De kelka tempo la Labora Oficejo jam uzas Esperanton en sia korespondado kun alilingvaj eksterlandoj. Oni ankaŭ jam prezentis al ni Esperantajn leterojn de la Oficejo, kiuj multe helpis konvinki dubemulojn pri nia afero. En „Esperanto“ (dec.) ni legas, ke UEA dankinde metis je dispono de la Labora Oficejo oficiston por plenumi la Esperantan korespondadon, ĝis kiam kelkaj oficistoj de la oficejo mem sufiĉe lertiĝis en Esperanto por prepari la leterojn mem. Volonte ni esperas,

Lingvaj Notoj.

De Walter Lippmann.

11.

Situi. (Situata — situita.)

En alia Esperanto-gazeto iu demandis (iom nalve), ĉu estas permesite diri: „La urbo estas situata sur la bordo de l' Rejno.“ Nu — permesita estas en Esperanto ĉio, kio ne kontraŭas al la Fundamento, nek al la ĉefprincipoj per si mem kompreneblaj de nia lingvo kiel lingvo internacia. Do ankaŭ la vorto „situata“ ne estas nepermesita. Ĝi havas eĉ konsiderindajn avantaĝojn. Ĝi estas formita laŭ la angla „situated“, itala „situato“ kaj similaj latinid-lingvaj vortoj, kiuj ĉiuj devenas de mezlatina verbo „sitiare“ kaj ties pasiva participo perfekta „situatus“. Ĝiaj du unuaj silaboj prezentas vortradikon tre internacian precipe per la substantivo „situacio“, kiun ankaŭ nelatinidaj lingvoj enhavas kiel fremdvorton.

Sed — ĉu ekzistas la bezono enkonduki apud nia radiko „sitiaci“ ankoraŭ lan novan pli-malpli egalsencan? Pri tio oni povas diferenc-opinii. Konservativulo diros eble: „Anstataŭ: la urbo estas situata sur la bordo de l' Rejno, oni povas tute kompreneble diri kiel Zamenhof kaj la germanoj: la urbo kuŝas... aŭ, se tio ne plaĉas, kiel la latinaj simple: la urbo estas sur la bordo de l' Rejno, kaj anstataŭ: ĝi estas bele situata, ni diru: ĝi kuŝas bele, aŭ: ĝia situacio (sur la bordo de l' Rejno) estas bela.“ — Kontraŭe, liberalulo rezonos: „Uzi la francdevenan „kuŝi“ por imiti germanan esprimmanieron — tio kontraŭas mian lingvosenton. Simpla, esti ŝajnas al mi tro senkolora, kaj ĝi ankaŭ ne estas bone aplikebla, kiam adjektiva atributo estas uzata. La renverso de la tuta frazo por ebligi la uzon de „situacio“ estas neoportuna, kaj verbon „situaci“ certe multaj ne ŝatos. Do radiko nova estas rekomendinda.“

Tute ne volante decidi, kiu de la du pravas, ni supozu, ke la Esperantistaro preferus la liber-

alan opinion. Tiam estiĝas la demando: kiu formo estas la plej bona? Efektive pri tio povas ekzisti dubo, ĉar ni havas tri eblajn:

I. radikon „sitiuat(-a)“ t. e. adjektiva = germ. „gelegen“, franc. „situé“, it. „situato“, angl. „situated“, hisp. „situado“;

II. radikon „sitiu(-i)“ t. e. verbo transitiva = germ. „sitiuieren, legen“, franc. „sitiuer“, mezlat. it. „sitiuare“;

III. radikon „sitiu(-i)“ t. e. verbo ne-transitiva = germ. „liegen, gelegen sein“, franc. „être situé“, it. „essere situato“, angl. „to be situated“, hisp. „estar situado“.

Pri I: Tiu ĉi formo aspektas plej internacia. Sed ĝi estas iom longa kaj peza kompare kun la germana: liegt = „estas situata“, kaj ĝi ne permesas formi taŭgan substantivon („sitateco“?).

Pri II: En ĉi tiu kazo oni devas diri: „la urbo estas situata“, ĉar la „sitiu“-ago, farita de la urbo (Dio aŭ naturfortoj) estas jam estinta. Filologie tiu ĉi formo estas la plej korekta, ĉar ankaŭ en la naturaj lingvoj la vortoj „sitiue, situato, situated“ ktp. estas pasivaj participoj perfektaj de la (parie neuzataj) verboj „sitiuer, sitiuar, sitiuate“ ktp.

Pri III: Ĉi tiu formo, eble iom radikale derjvita, reiras ĝis la latina vorto „situs“. Ĝi permesas uzi la tre praktikan esp. substantivon „la situo“ = germ. „die (landschaftliche) Lage“ (= das Gelegensein), ekz. „mi ŝatas tiun urbon precipe pro ĝia beleaga situo sur la bordoj de l' Rejno; bonvolu informi min pri situo, granda kaj prezo de tiu vilao; nia tendaro, kies situo en la monifaŭko estis konata de la malamikoj, estis pro tio en dangerega situacio.“

Ĉar krome la formoj „sitiui, situas“ ktp. estas tre mallongaj, tamen internacie kompreneblaj kaj bonsonaj kaj jam kelkokaze uzitaj, mi, supoze ke la Esperantistaro volas neologi-mon ĉiutusenecan, preferus la lastan solvon. Do: „la urbo situas sur la bordoj de l' Rejno; la insulo situas en la Mediteraneo.“

ke tiu ĉi fakto estas nur unua paŝo ĝis la ĝenerala uzado de Esperanto ankaŭ en la diskutadoj de la konferencoj.

Laboristaro.

En Bellinzona, Tiĉino, Svislando, prof. Pedrol malfermis kurson; partoprenas ĉ. 30 ĝisinstruistoj, fervojistoj kaj estroj de la loka socialismo, inter ili la deputito Zelli. En Lugano s-ano F. G. Isella gvidas kurson ĉe la laborĉambro.

„La Laborista Esperantisto“

donas jenan resumon pri la Esp. movado inter laboristoj en Germanio: La Düsseldorf'a grupo malfermis 2 kursojn; ĝi ankaŭ sendas instruantojn al diversaj apudaj urboj. Essen raportas pri 9 kursoj, krom tio 3 en diversaj sekcioj de la komunista partio por infanoj, novaj grupoj en Horst kaj Steele. Hamburg-Altona parolado de k-do Voigt (Leipzig), rezultato 5 kursoj. Riesa-Gröba 2 kursoj. Hannover 5 kursoj. Köln parolado de s-ano Hurler kaj parlamentano Fries, 12 kursoj. Magdeburg parolado de s-ano Voigt, nova kurso apogata de la sindikat-kartelo kaj de la instruistaro. Rostock 2 kursoj, unu speciale por la laborista junularo. — Nova grupo en Waldenburg (Silezio); tie ankaŭ 2 kursoj.

XI-a Germana Esperanto-Kongreso en Breslau.

3.—6. junio 1922.

Kvina komuniko.

1. La aliĝiloj estas disdonitaj al la grupoj, notitaj en G. E., n-o 5-a 1921. La tie ne menciitajn grupojn mi petas postuli aliĝilojn de mi. Krome ĉiuj gesamideanoj, sin anoncantaj al la kongreso, tuj ricevos la aliĝilojn.

2. Oni ne resendu aliĝilojn, sur kies posta flanko troviĝas streko tra ĉiuj demandoj, ĉar tiaj „respondoj“ estas senvaloraj. Oni nur tiam resendu ilin, se oni certe scias respondi ĉiun demandojn.

3. Bonvolu anonci sur la aliĝiloj, ĉu vi eventuale deziras malmultekostan loĝejon en „hospico“.

4. Por respondi kelkajn demandojn, ni sciigas post rea interkonsento kun la estraro de GEA, ke Esperanto kaj la gepatra lingvo kiel kongreslingvoj estas egalrajtaj.

5. Bonvolu helpi pligrandigi la garantian fondon! Kottzajo — ĝis 1.4.22: 20 mk. (por pluj samfamilianoj 15 mk.); poste po 10 mk. pli — estas sendota al s-o Habelok, poŝtekonto Breslau I, 13987.

Hanuschke, kongressekr.
Breslau IX, Hedwigstr. 11

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Originalan propagandon

por Esperanto faris la samideanoj de Stuttgart (Germ.). Ili pendigis ŝildetojn kun devizoj pri Esperanto en 20 vagonoj de la urba tramvojo. (La kostojn grandanime donacis unu el la membroj.) Poste ili metis en tagjurnalojn anoncojn, kiuj enhavis premi-enigmajn rilatantajn al la devizoj sur la supre menciitaj ŝildetoj. El la multaj solvoj 80% estis ĝustaj. La premioj konsistis en senpaga partopreno al Esp. kurso kaj en mondonacoj al la plej bonaj lernantoj. La rezultato estas tri kursoj. Krom tio komencis nova kurso inter katolikoj, kiun partoprenas, inter aliaj, 30 kantistinoj kaj 12 „fratinoj“ (insiruistino).

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro


Maria Ŝidlovskaja.

(45-a daŭrigo.)

La urboj fariĝis malpli grandaj, malpli gravaj, aperis arbaroj, riveretoj, grenkampoj kaj maizaj plantejoj. Ju pli ŝanĝiĝis la vidaĵo, kaj freŝa vento de kampoj kaj arbaroj penetris tra la fenestroj, des pli ofte Mateo aliris al fenestro, atente observante tiun landon, kiu flugrapide disvolvadis antaŭ la Loziŝcano pacajn bildojn de la bone konata vivo.

Samtempe iom post iom kaj senkonscie la animo de la ofendita kaj persekutata homo komencis degeladi. En iu loko li preskaŭ duone elŝoviĝis el la fenestro, postsekante per la okuloj la rapide preterflugantan plugkampon, sur kiu viroj kaj virinoj estis ligitaj garbojn da tritiko. En alia loko la preterkurantaj vagonaron rigardis fortikaj sunbrunitaj viroj, apogante sin sur ploĉoj kaj fosiloj. Mateo bone sciis la laboron de elradikigado, kaj lin nun ekposedis la deziro eliri el la vagono, preni fosilon aŭ ploĉon kaj montri al la homoj, kion li, Mateo Lozinski, povas fari kun plej fortika arba stumpo.

Sed la vagonaro ĉiam flintis kaj flugis, pezaĵoj ŝanĝiĝis, malgajajn tagojn sekvis ankoraŭ pli malgajaj noktoj. Kaj ju pli atingebis, pli komprenebla kaj simple fariĝis la naturo, des pli rapide degeladis kaj moligis la animo de la Loziŝcano, sin malfermante renkonte al la paca beleco de la trankvila, bone komprenata vivo; ju pli vekigis en li anstataŭ stulta malamo — komence scivolo, poste miro kaj paca kvieteco, des pli akra, pli profunda fariĝis lia angoro. Li sentis nun, ke por li ankaŭ troviĝus loko en ĉi tiu vivo, se li ne estus forturninta tuj de la komenco for de tiu



Grupo de polaj soldatoj de Bydgoszcz'a Militkomandejo, lernantaj Esperanton.

En la lasta vico la meza viro (I) estas s-ano Fr. Prengel, gvidanto de Pola Esp. Servo, kiu ankaŭ gvidas la Esp. kurson en la militkomandejo.

Sveda lando.

El „La Espero“, nov.-dec. n-o, ni ĉerpas jenajn novaĵojn: Kursoj en Eskilstuna (por komencantoj kun 35 p., por progresintoj kun 10 p.), Sigtuna, Kristianstad (20 p.), Västerås, Svanö, Göteborg (2 kursoj), Arvika, Nynäshamn (20 p.), Fittja. Pri agado de s-ano Einar Adamson ET jam raportis en iu antaŭa numero. Nova grupo fondiĝis en Ludvika kun 21 membroj.

Bulgario.

Laŭ sciigoj de „Bulgara Esperantisto“ okazas kursoj (krom la oficiala instruado en gimnazioj): en Sofia por geurbanol, vegetaranoj kaj junkeroj (militist-lernejanol), Kirghall, Stara Zagora kaj Varna (60 p.). Nova grupo en Kjustendil.

Jugoslavio.

„La Provo“ de 1. dec. raportas pri bone prezentataj kursoj en Split (Spalato), Trsat (24 p.) kaj Liberurbo Fiume (2 kursoj). Interesiĝo en Bakar kaj Sarajevo.

Kongreso de katolikaj pacifistoj.

De 4.—11. dec. okazis en Paris la I-a Internacia Demokrata Kongreso, kunvokita de la partio „Jeune République“. Ĝi estis kongreso de katolikaj pacifistoj el 20 landoj kaj vizitita de multaj eminentuloj kaj parlamentanoj. Centra Oficejo disdonis propagandilojn kaj vendis lernolibrojn. S-o d-ro Metzger (ĉefsekr. de Ika) ĉiuokaze propagandis Esperanton. F-ino Mayer, instruistino el Paris, dum raporto pri la reformo de instruado parolis ankaŭ pri Esperanto, same s-o Hecker, la delegito de Internacio de Junuloj por la Ligo de Nacioj

En La Mure (Isère)

prof. Caillet parolis pri la XIII-a Kurso estos organizata.

Lernejo.

Al nia noto en n-o 60 pri la instruado en Düsseldorf-Gerresheim oni sciigis nin, ke tie en profana lernejo okazas deviga instruado de Esperanto al infanoj de tiu lernejo en du klasoj.

La 5. dec. komeniĝis en popola lernejo en Hagen (Vesifalio, Germ.) instrua kurso pri Esperanto sub gvidado de s-o instruisto Petermann. Partoprenas 35 geknaboj de meznombro 11 jaroj.

Elĉerpitaĵ

estas numeroj 56, 57 kaj 58. Do ni ne povas plenumi ĉiun ajn peton sendi ilin al abonantoj aŭ legantoj. La plej bona vojo por havigi al si ĉiun el elĉerpitaĵoj numeroj estas anonceto. La provizo de malnovaj numeroj (malgranda formato) ankaŭ jam estas tre malgranda. Bonvolu legi ankaŭ la noton en n-o 60, 2-a paĝo.

lando, de ĝiaj homoj, de ĝia ĉefurbo, se li pli multe estus atentinta ĝian lingvon, ĝiajn kutimojn, se li ne estus mallaŭdinta en ĝi per unu fojo ĉion bonan kune kun la malbona... Sed nun inter li kaj la ĉi tiea vivo kuŝas la sorto de vago, eble de krimulo...

Ankaŭ la homoj, kvankam ili laŭaspekte ofte similis Paddy'ojn, tamen sin montris nun al li en alia lumo. Dum li vojaĝis, ŝanĝante vagonarojn, ŝanĝiĝis kelkfoje ankaŭ la pasaĝeroj same kiel brigadoj de konduktoroj. Sed la forirantaj pasaĝeroj ĉiam atentigis la novajn pri la grandega viro, kiu videble sin sentis iom ĝenata en siaj vestoj, — viro timema, konfuziĝema kaj kiel infano senhelpa. Neniu lin maltrankviligis, neniu lin tediis per demandoj, sed ĉiujfoje, kiam li devis transvagoniĝi, al Mateo aliris aŭ konduktoro, aŭ iu el la pasaĝeroj, prenis lin je la mano kaj montris al li lian novan vagonaron. La grandega viro humile sekvis la konduktan, rigardante al li per konfuziĝis sed dankoplenaj okuloj.

Krom tio, ĉi tie, en la fundo de l' lando, la homoj ŝajnis al li ne tiom similaj unuj al aliaj, kiel en tiu granda urbego, kie Mateo travivis sian malgajan aventuron. Ofte envagoniĝis alkreskaj farmistoj, brunigitaj de suno, larĝŝultraj, en vastaj sirtutoj kaj kun barboj, kiuj certe povus elvoki spritaĵojn de tiuj Nov-Jorkaj strataj kanaloj. Ifoje troviĝis meze inter la pasaĝeroj serioz-miena kvakero en sirtuto buonumita ĝis la mentono, aŭ stepa brutovendisto, aŭ ĉasisto el Kanada lando, vekanta ĝeneralan intereson per sia pentrida kostumo. Unufoje oni ekvidis grupon da bronzaŭtaj indianoj, kiuj revenadis al Washington kaj, envolvigitaj en siaj litotukoj, sidis ĉe apudvoja falro atendante la vagonaron, apatie fumante siajn pipojn sub la scivola rigardo de la pretervojaĝantoj, kiuj ĉiuj eliris el vagonoj por povi pli bone ilin observi.

En unu stacio, apud malgranda urbeto, kies konstruaĵoj vidiĝis super la rivero, eniris en la

Gazetaro.

Oeffentliche Sicherheit, Wien, 1. 12. (Art. de d-ro Pezlederer pri graveco de Esperanto por la polico.)
Reichenhaller Grenzboten, 8. 12. (Art. pri Esp. infanoj en fremdaj landoj.)
Gazeta Kolomyjska, 4. 12. kaj 27. 11. (Esperanto-angulo.)
Neue Lodzer Zeitung, 20. 11. kaj 27. 11. (Esperanto-angulo kaj raporto pri intervjuo kun Baudouin de Courtenay.)
Workers Dreadnought, London, 10. 12. (Esperanto-angulo.)
Reichenberger Zeitung, 6. 12. (Artikolo kaj raporto pri parolado.)
Bulletin Theosophique, dec. (Artikolo pri Ligo Internacia de Teozofaj Esperantistoj.)
El Artesano, dec. (A. Ferrer-Calvo raportas pri la XIII-a.)
Swiat Pracy, 1. 12. (Esperanto-angulo.)
Le Petit Journal, Paris, 5. 12. (Artikolo de Archdeacon pri Esperanto kaj la aera navigado.)
Les Echos, Paris, 7. 12. (Artikolo de Rollet de l' Isle pri Esperanto kaj la aera navigado.)

Recenzoj.

LIBROJ.

(Unuoble ricevitajn librojn.—prospektojn kip. ni ne recenzas nek mencias; duoble ricevitajn ni ĉiam mencias en la plej proksima numero. Eventuale recenzo sekvas poste. Se oni deziras recenzi, oni ne rajtas postuli eventualan kontraŭrecenzi. Ni rezervas al ni la rajton, ĉu recenzi aŭ ne lan verkon. Se oni ne deziras recenzi, sed nur menciion, oni speciale rimarkigu tion. — Kun monataj esp. gazetoj ni interŝanĝas unu ekz. de nia semajna ĵurnalo kontraŭ du de ilia gazeto, resp. du kontraŭ kvar.)

DR. ZAMENHOFS SPRACHLICHE GUTACHTEN (Lingvaj Respondoj) in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen von Walter Lippmann. Eldonejo: Ferdinand Hirt u. Sohn, Esperanto-Abteiluno; Leipzig 1921. 70 pĝ. 14/16; 22 cm. Pazo 10 gmk + sendokostol.

Kio estas la tasko de esploranta scienculo? El donita kradmaterio de specialaj faktoj abstraktige eltiri l'on ĝenerale validan, la ekzistantajn regularojn.

Kaj kio estas la nepra kondiĉo de fruktodona, sekundiga rezultato? Ke la bazigitaj specialaj faktoj estu ĝustaj kaj kompletaj; plue ke ankaŭ la rezonoj bazitaj sur tiuj faktoj estu ĝustaj (teorio de la juĝoj) kaj kompletaj (flankelaso nenajn elbajojn). Ne aŭskas nur la ĝusto; ĉar flankelaso de gravaj premisaj faktoj kondukas al la (ne ekzistantaj) vera scienco) konflikto inter teorio kaj praktikoj, kaj flankelaso de ebloj de rezonado kondukas al konflikto inter partioj ambaŭ pravaĵ (netoleremo).

Tia nekompleteco de premisoj kaj rezonoj kun siaj bedaŭrinde konsekvencoj estas la karakterizaĵo de preskaŭ la tuta esploranta lingva literaturo Esperanta de post la eksplodo de la mondilito: Aŭ oni blinde akceptas ĉion. Aŭ oni renversas la sciencan procedon, starigante laŭ nekompletaj bazoj pli-malpli apriorie regularojn; kaj kio ne estas enigebila en tiun liton de Prokrasto, estas alfarata per kripligo.

Hodiaŭ mi salutas post longa paŭzo la unuan original-ecan laboraĵon lingvolinterpretan, kiu plenumas la kvar supre cititajn kondiĉojn de progresigo: La kompletajn Lingvajn Respondojn de d-ro Zamenhof kun komentario La lingvaj respondoj, kiuj donis Zamenhof, estis ĝis nun disemintaj en du broŝuroj aperintaj en Parizo (malfacile havigeblaj de centra-ĉeĉerpanoj), en privataj korespondoj kaj aliloke. Nun s-o Walter Lippmann kunigis ilin en unu volumon, ordis ilin laŭ la temoj en ili pritraktitaj kaj tradukis ilin germanen; la multaj modeloj saĝoj eldiroj de ĝenerale naturo estas antaŭmetitaj en Ĝenerala Parto kun la titoloj (germanlingvaj) „Toleremo kaj libero“, „La naciaj

vagonon, kie sidis Mateo, nova pasaĝero. Li estis maljuna viro kun malgrasa vizaĝo, enkavigintaj vangoj, maldikaj lipoj kaj akra penetrema rigardo. Viro de stranga, eĉ iom ridinda aspekto, tiom pli ke li estis vesita kiel efektiva ĉifonulo, dum lia sintenado estis senĝena, eĉ flera. Lia vesto, verŝajne iam nigra, nun fariĝis griza pro la suno kaj la akra blanka polvo kaj montris multajn flavruĝajn makulojn. Lia pantalono estis mallonga, kvazaŭ infana, liaj botoj estis ankoraŭ pli flavgrizaj ol tiuj de Mateo, kiuj poris ankoraŭ postesignojn de l' broso de la negro Sam en Broadway. Tamen sur la kapo de la nekona viro sidis tute nova brilanta cilindro, kaj en la buŝo li tenis grandan bonspican cigaron, kies delikata aromo plenis la aeron de la vagono. Mateo jam pli frue miris pri tio, ke en Ameriko videble ne ekzistas apartaj vagonoj por popol-amaso, kaj nun li pensis, ke kelkaj pasaĝeroj sendube ne ekdeziros havi kiel sian najbaron lian sinjoron eh tia pantalono kaj kun cigaro en la buŝo, malgraŭ la nova cilindro, kredeble ŝtelita. Sed por lia mirego la maljunulon plenaspekte adiaŭsalutis en la stacio lu tre eleganta sinjoro kaj forĝisto en laborkostumo. Ili ambaŭ forte skuis lian manon sur la perono. Kaj kiam li eniris en la vagonon, lu juna sinjoro, ankaŭ bone vestita, tuj ĝentile forŝoviĝis sur la benko, por doni lokon al la maljunulo, kiu per kapmovo lin dankis, elprenis el la buŝo sian cigaron, kraĉis kaj etendis al la junulo la manon, elegante ganititan.

Dume la vagonaro flugis kaj flugis plue. Varma vespero per malpeza krepusko, ĉiam pli kaj pli blua kaj densa, envolvadis grenkampojn, arbarojn, ebenaĵojn. Egalmezura sonado de la lokomotivo vekis la arbaron, silente kuŝantan ĉe ambaŭ flankoj de la relvojo. Ofte vidiĝis sur arbaraj herbejoj fajroj, ĉirkaŭ kiuj lignohakistoj aranĝis sian ripozejon, iafoje briletis fenestroj de dometoj. En unu loko familio de farmisto vesper-

lingvoj kiel modelo“. „Malfacilaj tradukoj“, „Lingvuzo kaj logiko“, „Teorio kaj praktiko“, „Ŝanĝoj kaj reformadoj“. Al la plej multaj paragrafoj Notoj estas aldonitaj. Tiuj notoj kompletigas l'on diritan de Z., pliklarigas ĝin per saĝace elektitaj ekzemploj kaj eventuale konsistas, se la lingva evolucio intertempe likvidis problemojn aŭ iris alian vojon. Ankaŭ negermanoj povas profiti la tre ilustrajn ekzemplojn, parte ĉerplitajn el la verkoj de Z. mem. ne bezonante tiam neuzblan germanlingvan belaston: ili ordinare ne estas traduktitaj. Se al tiuj notoj rec mankus la sciencocaj kono kaj respekto de la faktoro, ili estus profanado de postlasaĵo de la mortinta aŭtoro de Esperanto; sed estas kontraŭe pri la belaŝpekta libro de Lippmann, dediĉita al s-ino Z.: ĝi estas inda memorato.

Des pli, ke la komentinto ne fariĝas malfidela al laj principoj, eĉ se foje la opinio de Z. ekŝajnas neprava: Kun fundeco li elmontras la neakcepteblon de la tradicia kutimo eliti la akuzitajn poŝt la adverbos „po“. La notojn al la paragrafoj 8/10a, 30c, 52b, 84a, 87a, 80/1a, 60a, 66b, 68a, 72d, 102b, 111a kaj 117a mi petas la komentinton revizii.

Pli-malpli frue ankaŭ la aliaj verkoj de Zamenhof devos esti eldonitaj en inda libroteknika aranĝo kaj kun komentoj. Tiam oni havos modelon en la libro kaj la principoj de Lippmann. Ni esperu, ke ĝis tiam estu ankaŭ pli da Esperantistoj kvalifikitaj seki viun modelon. (Eugen Wüster.)

ANTVERPENO. 52 paĝoj broŝur. 12:17 cm. Placa gvidlibreto arte presita sur bona papero, kun 19 belaj ilustraĵoj. Kontraŭ simpla respond-poŝtkarto ricevebla de Frans Schoofs, Kl. Beersstraat 45, Antwerpen, Belgio. Ĉiu havigu al la vere belegan libreton.

ESPERANTA KRESTOMATIO el verkoj de diversaciaj aŭtoroj. Kolektila de M. S. Valentinov. 12:16 cm. 32 pĝ. Eldono de Ĥersona Esp. Societo. 1921. Esp. oficejo de Narvaĵaj al M. S. Valentinov, Moskvo, Rusaĵ. Ĉudovskoj per. n-o 6.

GAZETOJ.

HUNGARA ESPERANTISTO. Nov.
JURNALO VIVANTA. Nov.
NEDERLAND-ESPERANTO. 5, 10, 17, 24., nov.
NOVA TEMPO. Okt.-nov.
SENNACIECA REVUO. Nov.
THE BRITISH ESPERANTIST. Dec.
BELGA ESPERANTISTO. Sept.-okt.

Poŝtabonantoj el Germanlando.

kiuj ne ricevis lun numeron de ET mendita senpere ĉe la poŝtoŝticejo, devas plendi pri tio ĉe la poŝtoŝticejo mem. Plendoj ĉe mi ne utilas. Tiu-rlataj sciigoj de niaj abonantoj aŭ petoj pri post-liverado de nericevitaj numeroj estu responditaj per tiu ĉi informo. Ni tre bedaŭras, ke tre ofte ET ĉe la poŝto perdiĝas, sed povas fari nenion alian ol, kiel kutime, regule ekspedi nian ĵurnalon.

La Preserar-Diabeto

kaŭzis ĉe kelkaj atentemaj legantoj de ET bonkoran ridadon pro iu preseraro en la antaŭlasta numero. Gustadire ĝi ne estis preseraro, sed nur malĝusta vortodisigo. Anstataŭ „karavan-gvidanto“ la kompostisto disigis „karavang-vidanto“ (vidanto de kara vango). Jam unufoje okazis simila ridindaĵo: en n-o 3/4 (speciala n-o pri la Frankfurta Foiro) oni povis legi pro malfeliĉa lokigo de la vortoj, pri „porkaj kontraŭopinioj“ anstataŭ „por- kaj kontraŭopinioj“

Enspezojn

por la grupa kaso aŭ por la propra poŝto niaj amikoj povas havigi al si, se ili kolektas abonojn por nia ĵurnalo. Ĉe mendo de pli ol 5 abonoj al unu adreso ni donas specialan rabaton de ĉ. 30 procentoj. Detalojn oni bonvolu demandi ĉe la administracio de ET.

manĝis sub ĉiela tegmento. En malfermita pordo staris virino kun infano en la brakoj, kaj eĉ flamo de kandelo ne sin movetis en senmova arbara aero

Mateo observadis ĉion ĉi kun miksitaj sentoj: hejmeca ŝajnis al li la ĉi tiea vasteco, kie apenaŭ komenciĝas la akra batalado de homo kontraŭ la naturo, sed kontraŭvole li malgajigis: same vivas le liaj Oslp kun Katerina, dum li... kio fariĝos el li en la fremda lando post tio, kion li estis farinta?

Tia maldolĉeco lin trapenetris, ke li preferis ekdormi. Li efektive jam dormis, sidante kun la kapo je tiu malantaŭen, kaj lia vizaĝo, lumigita per elektra lampeto, respugligis malĝojajn songojn, liaj lipoj konvulsie kunitriĝis, kaj la brovoj kunŝoviĝis kvazaŭ pro interna doloro

XXVIII.

La dormo ne ĉiam venas al ni ĝustatempe. Se ĉi tiun fojon Mateo ne estus dormanta, li aŭdus multajn interesajn aferojn, kaj liaj aventuroj finiĝus rapide kaj feliĉe. Sed li dormis, kiam la vagonaro haltis por sufiĉe longa tempo ĉe malgranda stacio. Ne malproksime de la stacidomo meze de arbara herbejo vidiĝis konstruaĵoj el freŝe hakitaj traboj. Sur la perono regis eksterordinara aktiveco: oni elvagonigis terkulturajn maŝinojn kaj ŝtonojn; aŭdiĝis brua kurado kaj laŭta kriado en stranga gorga dialekto. La amerikanoj-pasaĝeroj scivole observadis tra la fenestroj, opiniate verŝajne, ke tiuj homoj faras multe pli da bruaĵo, ol la cirkonstancoj postulis.

„Pardonu, sinjoro“, demandis la pasaĝero, kiu envagoniĝis en Milwaukee, „ĉu vi ne scias, kiuj estas la homoj?“

„Hebreoj el Rusujo“, respondis la demandito. „Ili fondis kolonion apud Dehltown

(Daŭrigota.)

La proksima Internacia Specimena Foiro de Barcelona okazos de 15.-25. Marto 1922.

Importo. Eksporto.
Pollanda Komercia Agentejo
 Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10
 deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.
 Nur pogranda firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.
Reprezentado. Perado.

Grandkomercejo de Furnirligno.
 Lignolado (Surglutaĵoj)
Julius Reinmann & Co. Germanio.
 Freiburg i. Br.
 Lignajoj.
 Eksporto al ĉiuj landoj.
 Reprezentantoj serĉataj.

Grandkomercejo de Maŝinoj
 Freiburg i. Br. Germanio
 Kirchstr. 24
 posedanto: J. Hug.
 Importo. Eksporto.
 Aŭtomobiloj :: Motorveturiloj
 Bicikloj
 Kudromaŝinoj Skribmaŝinoj
 Anstataŭaĵoj kaj Alaĵoj.
 Eksporto al ĉiuj landoj je fabriksprezoj.
 Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Intarsioj.
 Marketo-fabrikajojn el ligno, perlamoto kaj metalo por fabrikoj de mebloj, horloĝoj je favoraj kondiĉoj liveras

H. Knaup, Artmetiejo por Intarsioj.
 Karpfengasse 8, Heidelberg (Germanio)

Oni petu specialan proponon! Reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Kafejo Rösler

Trautenau, Ĉeĥoslovakio.
 Unuaranga Koncert-Kafejo.
 Esperanto-jurnaloj je dispono de la gastoj.

La plej bela donaco por Kristnasko.

Sinjoro Sinjorino
 Amiko Amikino
 Frato al Fratino
 Fianĉino Fianĉo
 Edzino Edzo:

SENPERA VENDADO de fabrikanto al uzanto ŝparigas al vi 1/4 de la prezo de aĉetataj objektoj. Ĉu vi deziras sekvi la parizan modon? Se jes, aĉetu belartajn kaj originalajn esperantajn insignojn. Sinjoroj, mendu rubandan pendadon por poŝtorĝo kun verda stelo el galalio, la rando emalita. Sinjorinoj, mendu juvelpendadon kun rubando aŭ perloj (laŭ elekto) kaj verda stelo el galalio. Prezo por ĉiu dek frankoj en rekomendita sendaĵo. La nemunitaĵo pendado kvin frankoj. Grandecoj: 0,025 kaj 0,040. La firmo vendas egale ĉiujn parizajn artikolojn de propra arta kreado. Detalaĵoj klarigol kontiĉu respond-kuponon. Ĉiuj mendoj estas akurate prizorgataj. Skribu al: Atelier Esperanto (direktorino fraŭlino Gérard, vic-del. de UEA), 9, rue d'Armaille, Paris 17.

Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano de J. Sapiro (Joŝo)

Rekomendita de Esp. Lit. Asocio.
 Plej bona kaj amuziga legaĵo por esp. grupoj. 42 paĝoj, kun ilustraĵoj. Prezo 5 respond-kuponoj stampitaj.

Demandu specialajn prezojn en naciaj valutoj. — Libroj kaj esp. vendejoj ricevas rabaton je pli granda mendo.
 Mendu ĉe Pola Esp. Servo, (Fr. Prengel), Bydgoszcz, Kordeckiego 1a (Polujo).

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 fl., i. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anstataŭ vin kiel abonanto.
 Oni invitas artikolojn nepagolajn. Bonvolu enmeti kuponon, se neceso respondo.
 Redaktoro,
 4 Princeton St., London W. C. 1.

Art-Amikoj,

Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,
 kiuj havas intereson por belegaj akvaretoj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfegasse 5.
 Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ino Rozalia Wagner, 17-jara komercistino, Timiŝoara IV, bul. Carol I, n-o 9, Ruman., deziras interŝanĝi nur ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj en ĉiuj landoj.
 S-o Werner Kluge, Tallinn, Waksaliitn no. 18-2, (Estonio), deziras korespondi kaj interŝanĝi.
 S-o Rudolf Rosenfeldt, Tallinn, Waksaliitn 18-1, (Est.), de ziras interŝanĝi poŝtkartojn laŭ katalogoj de Michel 1920 kaj 1921, 22.
 F-ino Johanna Avik, Tallinn, Estonio, Kadakastr. 9-2, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝas fotografiaĵojn.
 F-ino Adele Silberg, Tallinn, Estonio, Mehanikastr. 7, 6, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.
 F-ino Ellino Lühke, instruistino, Tallinn, Estonio, Manejastr. 10, 15, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj amikaj leteroj kun gesamideanoj de tuta mondo, ŝanĝos fotografiaĵojn.
 S-o Hans Hurler, Köln, Chlodwigpl. 26, deziras interŝanĝi Esp. sigelmarkojn, kaj aliajn reklammarkojn de kongresoj, ekspozicioj ktp.
 F-ino Giolla Giuseppe, Via Ponte Seveso 50, Milano, Italio, deziras korespondi kaj interŝanĝi per poŝtkartoj, poŝtkartoj (bildflanke), leteroj, portretoj, papermono kaj ĉio.
 F-ino Adele Lindfors, Finnlando, Viipuri, Kirkko-saarekatu 6, as 25, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.
 Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, pk. 15, deziras korespondi letere kun spertaj gvidantoj de esperantaj kursoj pri pli intensa kaj interesa instruistaro.
 Haapsalu, Estonio, s-o J. Rand, Kaldla 31, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.
 S-o Emil Elstner, Grottau 425, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas esp. gazetojn kun ĉiuj landoj, esceptite Germanio.
 S-o Edmund Fethke, Bydgoszcz, Petersona 11, Pol., deziras korespondi kun japaninoj kaj ĉinoj per poŝtkartoj ilustr.
 S-o Martii Turunen, Viipuri, Finnlando, Pontusk. 1, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtkartojn.
 35 fervore lernantaj geknaboj (11-13 j.) serĉas samaĝajn gekorespondemulojn. Ilustr. poŝtkartojn al instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobritz, Germanlando.
 S-o Jones, 9 Hurry St., kaj s-o Williams, 27 Peel St., Dingle, Liverpool, Anglujo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, leterojn, poŝtkartojn kaj fotografiaĵojn kun ĉiulandaj samideanoj.
 F-ino Cialina Montaner, Danús 1-1, Palma de Mallorca, Hispanio, interŝanĝas ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn kaj poŝtkartojn, korespondas esperante, france, angle kaj hispane.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
 Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj an ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
 Prokuras komercajn adresojn.
 Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
 Interrilataĵas kun nederlandaj komercistoj kaj industristoj.
 Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Abonejoj de ET

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraai, Antwerpen.
 Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
 Ĉeĥoslovaka: Otto Štlenčka, Hradec Kralové.
 Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
 Finna: O/Y. Movado A/B, Kasarminkatu 20, Helsinki.
 Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
 (Abonprezo: 0,45 fl. x nombro da dezirataj sinsekvaj numeroj.)
 Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2.
 Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
 Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 13, Kaunas (Kovno).
 Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
 Rumana: Andreo Ĉe, Cluj, Transilvanio, Calea Victoriei 129.
 Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu esperantisto.
 Prezo sur tutaĵo papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografiaĵoj.
 (Funebra procesio sur strato Teatrajna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 15 germ. mk. kaj sendkostoj.
 Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

Anoncetoj.

ET n-ojn 8, 10, 11, 12, 13, 14, 17 kaj 21 deziras aĉeti s-o A. Ferrer, Asturias 44, I, Barcelona, Hisp.

POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Świat Pracy“, organon de Asocio de Laboristaj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevebla ĉe Księgarnia Robotnicza, Warszawa, Wspólna 17.

KOOPERATIVAJOJN sendu al Kooperativa Societo en Liverpool (per adreso: Jas. Jones, 9 Hurry St., Dingle, Liverpool) por konvinki ĝin pri la utilo de Esperanto, por ke ĝi aranĝu kursojn en la urbo.

„GVIDILIBRO DE GIRONA“. — Mendu ĝin ĉe la grupo „Gerona Espero“, Urdomo (Cases Consistorials), Girona, Hisp. — Belegaj gravuraĵoj kaj detala arkeologia kaj historia prikskribo de la urbo. — Prezo unu peseto aŭ alia egalvalora monsumo.

ATENTU! Ĉiujn demandojn, mendojn kaj sendaĵojn direktu nur al sekvanta preciza adreso (ne forgesu mencii la nomon de la gvidanto): Pola Esperanto Servo, s-o Francisko Prengel, Bydgoszcz, Kordeckiego 1a, Pol.

ARTPENTRISTO Georgo Bohutinsky, Praha II, Ĉeĥoslovakio, Palackého nabreží 1672-56 n, pentras per plumo sur koloraj paperkartoĵoj aŭ per karbo motivojn de Praha (kongresejo), kasteloj, ruinoj de Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ li faras pentraĵojn laŭ fotografiaj pejzaĝoj el diversaj landoj. Pligrandigas portretojn laŭdeziro. Moderaĵ prezoj. Petu informon! — Kiu povas havigi al mi videkarton aŭ fotografiaĵon de la kongresejo de la XIV-a en Helsinki por fari aktualan pentraĵon per plumo aŭ karbo?

ITALA LINGVO. Esperantistoj, kiuj scipovas aŭ lernas italan lingvon, abonu kaj legu la novan revuon ilustritan semajnan „RINASCITA“ („Renaskiĝo“), bonege amuza kaj instrua, kun propaganda rubriko por Esperanto. Skribu: „Rinascita“, Via Avvocata a Piazza Dante 25-27, Napoli; aŭ al F. Cesarini, del. UEA, Potenza.

DIAPOSITIVOJ POR LUMBILDOJ de la XIII-a Kongreso, en sep diversaj specoj jam montritaj, por 180 kĉ. Inki, poŝtelspezoj; poste serio de la fotoj el la XIII-a: Malferma kunsido 12 kĉ., fremduloj 12 kĉ., 2 Karluv Tyn po 7 kĉ., granda grupo 12 kĉ. kaj kelkaj en poŝtkarta formato po 3 kĉ. Riceveblaj ĉe J. B. Vlach, Praha II, poŝt-fako 504.

NEPRE ĉi devas legi la ĵus aperintajn originalajn poemojn de d-ro K. de Kolocay (kolekto „Mondo kaj Koro“), kiuj estas brila pruvo pri la literatura kapableco de nia lingvo. Prezo: unu resp.-kup. — Por la sama prezo „Ses Noveloj“ kaj „Bonhumora Rakontoj“. Mendu ĉe Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.